3.ª JARO N.º 39 KAJ 40 MONATA ESPERANTO-GAZETO AŬGUSTO-SEPTEMBRO 1938

# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

## KVAZAŬ REGNO DE VIRINOJ

La ĉefaj urboj de la Respubliko montras nun kuriozajn bildojn, similaj al tiuj, kiujn oni priskribas en fantaziaj romanoj pri regno de virinoj. Lastaj soldataj kontingentoj forprenis grandajn kvantojn da viroj, kies lokon en la socio okupas anstataŭe la virinoj. Jen virinoj ĉie! Ege multege da jupoj nuligas la pantalonojn sur centraj avenuoj...

Jam antaŭ ol la milito, en Hispanio, la statistikoj asertis, ke virinoj abundis pli ol viroj, laŭ rimarkinda procento. Sed, por ĉiu ordinara observanto, la statistika aserto ŝajnis malvero, ĉar en publikaj lokoj, kiel stratoj, parkoj, teatroj aŭ kafejoj, vigle svarmis la viroj dum, iomete ŝoke, malabundis la virinoj, kiam ili ne mankis absolute.

La mistero de tiu reliefa kontraŭdiro, inter la oficiala k ŝajna realoj, estas klarigebla se oni konsideras la situacion de la hispana virinaro dum regado de la monarkio. Sub la reakcia influo de feŭdaj konceptoj, la virinoj elspezis sian vivon inter drapoj, vindoj, kaseroloj k potoj. Tial, kvankam pli multenombraj ol la viroj, preskaŭ neniam montriĝis publike la virinoj, ĉar rutinemaj devoj k absurdaj kutimoj enfermigis ilin en la luksan aŭ mizeran kaĝon de ilia hejmo, je kiu nur la patro aŭ la edzo posedis la ŝlosilon. Karcero anstataŭ nesto!

Venis la Respubliko k frakasis la dikajn trabojn de la virinaj ĉeloj. Tamen, kvankam la leĝo forigis la materiajn barojn, la belaj birdetoj ne povis ankoraŭ libere forflugi ĉar la flugiloj estis tro malfortaj, pro longa neuzebleco. Iom post iom, la demokrata reĝimo spertigis ilin en la fakta ĝuado de freŝaj politikaj rajtoj. Delikate ornamiĝis, pro virina ĉeesto, aŭloj de universitatoj k aŭditorioj de la Parlamento. Sed la definitiva publika elmontro de la virino, en impona lavango, okazis ĉe la balotado, kiu referendume en historia Februaro venkobatis la faŝismon. Tiam, la virinoj, voĉdonante por listoj de la Popolfronto, ŝiris siajn rilatojn kun la estinteco. La muzo de poetoj jam estis civitanino k plenrajta persono!

Eksplodis la faŝista komploto, kiu malrekte celis sklavigi denove la virinojn; k la virinoj apud la viroj sciis morti defendante per armiloj ĉe mano, sian liberecon. Kaj ili nun, restante preskaŭ solaj en la postfronto, daŭrigas la batalon sub aliaj formoj, laborante senlace k skizante strangetan aspekton, en la ĉefaj urboj, kvazaŭ bildoj el romano aŭ filmo pri fantazia regno de virinoj...

## Konsideroj tra Komentarioj

Ŝtormoj k ventoj de nova aŭtuno blovas jam en Hispanio! Velkas la folioj sed ne velkas la mirinda rezistado k eĉ la bravega kontraŭpuŝo de la hispanoj, kiuj ŝatas la liberon pli ol la vivon. Retrospektivaj bildoj logas al komparo: Antaŭ unu jaro, Asturio fermis la epilogon de la norda epopeo. Ondo de indigno trakuris la mondon. Nobla kolero agacis dentojn k svingis pugnojn de honestuloj, pro la abomena diplomata komploto sendefendigi popolon k liveri ĝin, tiel, en la ungojn de kruela malamiko.

Kiel balasto, por la noblaj impulsoj de la amaso internacia, aperis tiam la filistraj kalkuloj de tiuj adeptoj de la tiel nomata «praktika politiko», kiuj frivole sin ĵetis en la fluojn de brilaj aŭguroj por la Faŝismo. Oni antaŭfiksis la triumfon de Franko k la pereon de la Respubliko, laŭ difinita dato, supertaksante la detrueman potencon de Italio kun Germanio, k malaltigante la grandiozan rezistokapablon de Hispanio.

Pli danĝera, kvankam malpli videbla, estis tamen la interna situacio: Konkurenco pri la influa rolo de sindikatoj aŭ partioj; ĵaluzoj inter gvidantoj; skismoj ĉe veteranaj organizoj; eĉ kolizioj sur la stratoj de kelkaj urboj... Sub tiel malagrablaj signoj, doktoro Negrin prenis la direktilon de la antifaŝista ŝipo, en plena fulmotondro. En la direkcio mankis valoraj apogoj, ĉar frakcio el socialistoj k organizo el anarkistoj tute ne volis kunlabori.

Daŭris k akriĝis la milito. La vantaj aŭguroj, pri tuja pereo, krevis kiel sapoveziko. La marŝo mem de la faktoj admonis severe pro pasintaj eraroj. Regrupiĝis la fortoj; reamikiĝis la tendencoj. Kaj hodiaŭ, jen la sama doktoro Negrin prezidas masivan blokon, kie rekte kunlaboras, sen ia suspekto, reprezentantoj de ĉiuj opinioj—de konservativaj respublikanoj ĝis aktivaj anarkistoj!—Dum la daŭro de unu jaro tre drameca, la hispanoj ne vane lernis k spertis. Ĉirkaŭ la registara akso, ili nun laboras intense, batalas kuraĝe, komprenas diafane k rezistas fierege. La milita scenejo transloĝiĝis; la dramo okazas nuntempe preter la helaj bordoj de la blua Mediteraneo. Oni fosas tranĉeojn en la spongeca grundo, kiu abunde produktas oranĝojn, karobojn, vinberojn k olivojn. Se la invadintoj gajnis, en lasta fortostreĉo, novajn pecojn de hispana tero, la popolanoj ankaŭ gajnis fidon je si mem, sciante la malfacilecon, por la faŝistoj, oftigi multajn atakojn por konkeri nur kelkajn hektarojn da tereno anstataŭ la definitiva venko.

Tial tia lukto estas kvazaŭ civitana devo. Oni militas obstine—sen penso pri kapitulacio!—avide sopirante samtempe je la paco. Jen do alta kvalito ne facile komprenebla por tiuj, kiuj ne tre funde konas la hispanan psikologion. Perdiĝas torentoj da sango, detruiĝas imponaj riĉaĵoj, sed tiu pereado k tiu detruado neniel malvarmigas la fervoron al tiuj, kiuj bedaŭrante la domaĝojn, scias ne submetiĝi al la despotismo por eviti similajn dolorojn al la homoj de aliaj landoj. Kiam oni parolas al la popolarmeanoj, por inciti ilian kuraĝon, ĝis plej alta grado, oni neniel emfazas pri bonstato por la hispanoj sed pri feliĉo por la tuta homaro.

Nur dank' al tia sinteno, ankoraŭ ne krevis la nigra nubego, kiu ŝvebas minace super la mezo de Eŭropo. Ho, kiel abomene sonas la hipokrita diro, ke oni ne helpis la hispanojn por savi la pacon!... Jam ne plu taŭgas la emfaza voĉo de malfrua pento! Se la tragedio finfine etendiĝas, estu respondecaj tiuj friponoj, kiuj mensogis pri paco por iel kovri sian malkuraĝon aŭ... sian kunkulpecon en la krimo kontraŭ Hispanio.

Kaj Hispanio—la ofendita Hispanio!—batalas k batalas, sen atentoj al lamentoj, ĉar fiere ĝi perceptas, ke ja krom viktimo ĝi estas simbolo. Post plej fortaj premoj, brilas sekure en ĝia diademo tri kolosaj juveloj Madrido, Barcelono k Valencio; tri unuaj ĉefaj urboj, kiuj, kune kun honoraj vundoj, montras ekzemplon k signas vojon al la minacataj popoloj avertante ilin, ke en simila okazo, la plej trafa defendo ĉiam estas oportuna frapo.

# Laborante en Nova Posteno

Ĉe mia soldatiĝo, la Kuracista Militista Tribunalo, post rigora kontrolado, deklaris min taŭga nur por helpaj servoj, pro malsano en la koro. Dum tri monatoj, mi loĝis en vilaĝa kampamento ekzercante militistajn laborojn k atendante la momenton povi okupi jam konkretan postenon en iu ajn helpa milita servo, akorde kun miaj profesiaj kapabloj. Finfine venis oficiala mandato, per kiu oni destinis min, kiel skribiston k desegniston, en la komanda oficejo de la modela Militista Hospitalo, kiun subtenas k patronas en Onteniente la Socialista Internacio k la Sindikata Internacia Federacio.

Kaj jen mi jam ekoficas en la nova postenol Onteniente estas granda, bela k higiena vilaĝo kuŝanta ĉe la deklivo de monto el abrupta regioneto en la sudo de la Valencia provinco. En proksima ĉirkaŭaĵo, nova ŝoseo, sur gracia ponto el moderna konstruo, kondukas al grandega domo, eksa franciskana monaĥejo, kie situas la Hospitalo iome pli alte ol la urbo. En la komenco de la milito, la efikaj klopodoj de la loka Popolfronta Komitato transformis malvastajn ĉelojn en puraj aerumitaj ĉambregoj por kuraci k flegi la unuajn vunditojn.

Kiam la sanitaraj bezonoj de la Respubliko postulis pli ampleksajn instalaĵojn, la Registaro elektis ĝin, kiel bazon, por centralizi la malavaran solidarecon de la eksterlandaj popoloj. Post lertaj masonaĵoj, k konvenaj ŝanĝoj, la Socialista Internacio prenis sur sin la taskon provizi la institucion per adekvata materialo k kompetenta fakularo. Frukto el tia diligenteco estas mia nuna laborejo, plej perfekta hospitalo, kiu funkcias en Hispanio. Dudek lumplenaj blankaj puraj salonoj, en tri etaĝoj, entenas proksimume 600 litojn, distribuitaj laŭ specialeco de la vundoj. Bonega servo por banoj k duŝoj estas preta ĉiuhore dumtage. Oni manĝas komforte, en du vastaj ĉambroj, abundajn k nutrigajn manĝojn, kiuj pretigas lertaj diligentaj kuiristoj, en moderna kuirejo. Glate plenumas sian taston laborejoj por kudrado k lavado. Apud ĝardeno, en la malnova kunvenejo de la monaĥejo, pompas arteornamita distro-salono, kun bone instalita scenejo, kiel prezidumo de konvena materialo: biblioteko, skribotablo, radioaparato k tri pianoj inter ceteraj ludiloj k distriloj. Tie oni ludas ofte antifaŝistajn komedietojn, koncertojn k deklamadojn. Mi intencas, tie mem, fari paroladeton al la vunditoj, pri la utilo de Esperanto, k eĉ gvidi kurson inter ili.

La militista oficistaro dividiĝas je teknikaj k helpaj elementoj. La unuaj estas kuracistoj k farmaciistoj, sub komando de direktoro kun kategorio de leŭtenanta kolonelo. La fakta militistaro estas taĉmento el proksimume 70 soldatoj, por helpaj servoj, kun kvin kaporaloj sub komando de serĝento, plej supera militista gvidanto. Ĉiuj soldatoj, kiel mi, senescepte, estas deklaritaj, de kompetenta tribunalo, pro internaj organikaj difektoj, ne taŭgaj por batali en la fronto sed nur por kvietaj militaj laboroj. La ekstera k interna aspekto de la domo tute ne ŝajnas kazerno. Oni ne aŭdas trumpetojn nek komandajn voĉojn. La uniformo estas nur pajlokolora ĉemizo kun sanitara insigno. Mi ĝuas la bonan ŝancon ofici en la komanda oficejo, kiel sola soldato apud la serĝento—bona amiko anstataŭ severa superulo—kiu ĝentile permesas al mi dediĉi kelkajn horojn ĉiutage por pretigi manuskriptojn k korekti presprovaĵon, kio, dank' al normalaj poŝtaj komunikoj inter Valencio k Onteniente, ebligas la aperon de POPOLA FRONTO.

Kvankam modesta, mi estas do nun unu el la radetoj de la administracia maŝino de tiu modela institucio, kie diligentaj manoj k inteligentaj cerboj mildigas dolorojn k humanigas la militon. En la Hospitalo de Onteniente, plene elverŝiĝas k hele montrigas la fervora sindonemo de la tutmonda popolanarol

Ludoviko HERNANDEZ

Ĉefredaktoro de POPOLA FRONTO

## BOMBARDU HOSPITALON... PER POŜTKARTOJ!

Tio ne estos peko, sed bona ago por helpi miajn klopodojn pri Esperanto en la militista Hospitalo, kie mi deĵoras. Mi bezonas konvinki ĉiujn per pruvoj, ne per flamaj vortoj, ke Esperanto—krom alta idealo - estas fakta realo.

Kiu el la legantoj volas elekti belan poŝtkarton el sia urbo aŭ el sia lando k, skribante kelkajn salutvortojn, sendi ĝin tuj al mi, laŭ jena oficiala adreso?:

LUIS HERNANDEZ
Oficinas Destacamento Sanidad
HOSPITAL MILITAR
ONTENIENTE (VALENCIA) HISPANIO

Per la ricevita materialo mi aranĝos tre artan ekspozicion sur la muro de la distro-salono.

Se vi helpas min, nur iomete, la sukceso estas certa k neniu povos diri, pro via silento al mia voko, ke la ĉefredaktoro de POPOLA FRONTO blufis.

Mi respondos private aŭ pere de la gazetol

# ĈIAM LA SAMA VERO

**La paco meritas ĉiujn oferojn, krom tiu de la justeco, ĉar paco sen justeco, ja certe, ne estas efektiva paco!** :-: :-: :-:

Doktoro Negrin, Prezidanto de la Hispana Registaro k ties ministro por Nacia Defendo, faris al korespondanto de la angla ĵurnalo *News Chronicle* jenajn deklaraciojn kies eĥoj estas fortaj batoj sur la amboson de la diplomata indiferenteco:

«Mi dankas vian gazeton pro la ŝanco, kiun ĝentile ĝi havigas al mi por montri miajn pensojn al la brita popolo. En la dua datreveno de nia milito, mi volas refoje substreki la daŭran ekziston de unu granda eraro: Pretendi fari, el nia lukto, simplan epizodon en la historio de Hispanio, kvazaŭ afero facila je izoligo per stranga asepsa politiko.

La apliko de tia politiko estas makulo por la brilo de la brita imperio ĉar tiu sinteno sin apogas sur absurda ignorado de la rajto, kiun nia popolo havas por defendi sian ekziston. La paco meritas ĉiujn oferojn, krom tiu de la justeco, ĉar paco sen justeco, ja certe, ne estas efektiva paco. Oni komprenu tion!

Bone mi komprenas la teruran respondecon, kiun havas la politikaj fortoj, kiam temas pri konservo de la paco. Sed jam daŭras du jarojn la ega doloro, dum kiu la hispana popolo baraktas inter du atakoj: tiu de la faŝistaj landoj k tiu de la demokrataj nacioj, kiuj kaprice neadas al ĝi la leĝan apogon de sia helpo. Jam estas horo dediĉi al la memoro de niaj mortintoj la justecon de novaj metodoj.

Ĉe la plej supera pinto de ĉi tiu dua datreveno, mi rajtas aserti, ke la emo por firma rezistado restas ankoraŭ tre flama. Ni daŭras spertante la plej kruelajn ofendojn. Malgraŭ tio, fortan konvinkon ni sentas ĉar la krimo, kiun oni faras kontraŭ la Respubliko ne restos sen puno. La barbareco ĉiutage estas pli fanfarona ĝuante la privilegiojn, kiujn al ĝi havigas la Ne-Interveno kun la vosto de siaj nekvalifikeblaj metodoj. Ankoraŭ nun estas la infanoj—niaj malfeliĉaj infanoj, jam nesciaj pri nenia teruro—kune kun virinoj k maljunuloj, la ĉefaj militaj celitaĵoj. Mi estas absolute konvinkita, ke la sentoj de la brita civitanaro estas tute kontraŭaj al tiu ĉi perversa taktiko. Kaj certe venos la momento, kiam via nobla popolo ekdiros energie: «Sufiĉe jam!» Kaj mia plej sincera deziro estas, ke tiam—kiam tio okazos—estu ankoraŭ eble eviti la eksplodon de ĝenerala hombuĉado simila al tiu de Hispaniol»

# LA DANĜERO ĈIE EKZISTAS

Multaj el niaj batalantoj ade grumblas pri la *paradiza* vivo en la ariergardo. «Ili (la civiluloj) ne volas forlasi sian komfortan vivon dum ni loĝas ĉi tie: jen en tranĉeoj, jen sur montopintoj, jen en valoj, sendorme, senmanĝe, malseke, malpure, mizeraj kun pedikoj k vundoj. Kial ili ĝuas dum ni suferegas?» Diradas multaj.

Tiaj paroloj aŭdiĝas ofte ĉe lipoj de batalantoj ne tre kleraj bedaŭrinde. Ne sufiĉe klaskonsciaj, al ili doloras la ekzisto de civiluloj. Ili ne perceptas, ke ne ĉiu povas iri al la fronto. Unuj pro malsano, aliaj pro sia aĝo. Sed ni jetu rigardon al la ariergardo! Tie ja multon oni faras. Ŝvite oni laboras en municifabriko (kio cetere ne malpli necesiĝas ol la armeo meml). Senripoze oni terkulturas la grundon por asekuri panon, legomojn k fruktojn al la armeo k al la popolo. Tamen, la viraj fortoj notinde mankas jam, inter kelneroj k razistoj. Tiaj k similaj profesioj konsistas nur el 10-12-jaraj buboj!

Ni ekzamenu ankoraŭ iomete pli la *bonan* vivon ĉe la ariergardo: Vivdanĝero preskaŭ tiel granda ol sur la fronto pro teruraj k oftaj bombardadoj. Se oni nur imagas ĵusan okazintaĵon, la konkludo estos klara: 180 faŝistaj bomboj falegis sur urbon el nur 30.000 loĝantoj dum la longa daŭro de kvar horoj. Restis plene detruitaj 60 domoj, inter ili hospitalo kie kuŝis multaj malsanuloj. En la grandaj urboj, oni ne povas rifuĝi tiel facile kiel surfronte; tion ĉi ja bone scias ĉiu frontano! Kial do citi pli da vivdanĝeraj momentoj? Krome, kia paradizo estas tio, kie tute mankas tabako, sukero k sapo, kie preskaŭ plene forestas la pano k aliaj ĉefaj nutraĵartikoloj, kiuj ĉe la fronto ekzistas?

Mi verkas ĉi tiujn liniojn, ĉar mi mem konstatis persone la eraran opinion pro ĵuse travivita teruraĵo: Pro vundoj ĉe la buŝo, mi iris en hospitalon. Apenaŭ alveninte, mi aŭdis laŭtan k trifoje ripetiĝintan eksplodan bruegon. Oni ĝenerale ne atentas tiajn okazintaĵojn. Oni tro kutimas al tio; do ankaŭ tiun fojon mi ne atentis la bruon daŭrigante la legadon de iu ĵurnalo. Forpasis duona horo k haltis ambulanco antaŭ la hospitalo. Oni rapide serĉis helpantojn. Mi ne sciis pri kio temis, tial mi alproksimiĝis. Tiam aperis antaŭ miaj okuloj terura vidaĵo sangon stagniganta: Tri *ariergardanoj*, tri laboristoj el municifabriko, pro kiu ajn kaŭzo aŭ malhelpaĵo, restis ŝiritaj pro subita eksplodo de kelkaj bomboj. Ho kiaj vizaĝoj! sen nazo sen okuloj, sen oreloj kun bruligitaj gingivoj k forfalintaj dentoj. La korpoj vaste bruligitaj estis plej impona atesto pri la danĝeraj laboroj de la ariergardo.

En la modernaj militoj ne ekzistas diferenco en la riskoj, k en la defendo de la homaj rajtoj ankaŭ ne devas ekzisti suspektoj...

Jozefo TENENBAUM
Internacia Brigadano

# EN ĈIRKAŬBRAKO PATRINA!

Ploranta li tiras la vestojn ŝiritajn
De tremanta pro timo patrino,
Al ŝia kolo li kroĉas plektitajn
Manojn, kaj kapon ŝovas al sino.

Kvazaŭ serĉas protektan rifuĝon
En ĉirkaŭbrako de milda patrino,
Eksploras korŝire aŭdante la muĝon
De freneza kanono kaj tondra senfino.

Kraĉanta furioze fajron mortigan
Al tiu ruino-amaso fumanta,
En koro ŝirita ion timigan
Sin ŝovas, ho, infano ploranta!

La milda patrino por lin kvietigi
Kun interrompita voĉo kantetas,
Kaj ne ĉesanie infanon luligi
Ŝi melankolie kantvortojn ripetas:

– Ĉe l' bordo de l' maro en horo vespera
Nimfo al nimfo la harojn plektadis,
Dum tiu vespero—vespero somera—
Plej juna la nimfo tre ĉarme kantadis:

Triloj de voĉo, argenta sonoro,
Glitu sur verda mara ebeno.
Ĝis la palaco de blanka marmoro
Ĝis la korala princa ĝardeno.

Li ektremis, vekiĝis denove ploranta
Kaj ĉirkaŭrigardis timeme,
Sian patrinon li tiras amanta
Kaj flustre rakontas li ion fideme:

Peza krepusko. En dormo pasie
Dormis eĉ ŝtonoj de l' urbo,
Ekflagris tra nokta malhelo kaj ĉie
Monstro aperis preta je murdo.

La dentojn grincante minace,
Kruela, terure sangavida,
Ekpaŝis la monstro. Homoj senpace
Senorde, haose fuĝis senbride.

La monstro fantome ĉie aperis
Maĉante homkarnon ŝakale.
Toastis per sango, triumfis, koleris,
Bruegis, buĉadis ĉiam vandale.

De monstroj alkuris tuta taĉmento
Preta la mondon detrui ĝisfunde,
Belzevul' per psalmoj de fisakramento
Karnon ricevis ofere, abunde.

Patrinoj, infanoj kun morta aspekto
Ploris kaj preĝis; ofte malbenis.
Al korŝira vekrio nenia protekto,
Nek io konsola de ie alvenis.

Velkadis la vivo, ĝermoj putradis,
Kreskis, grandiĝis fumanta ruino.
Palaj viktimoj fuĝante kuradis
Ĝemis infanoj, ho, kara patrino!

Longa la vico de plorantaj virinoj
Kun kave profundaj nigraj okuloj,
Estis la vico de suferantaj patrinoj
Kun purpure ruĝaj, ĉe brustoj, makuloj.

Tiujn suferojn tra sonĝo mi vidis
Kaj same mi sentis suferon,
Tra kiuj honeste iu nin gvidis
Flustrante mi'dvoĉe: Esperon!

Kaj ridetante tra larmoj brulegaj
Ŝi kantis kiel kantas martiroj,
Prikantis liberon per vortoj belegaj;
Sarkasme mokante pri vanaj sopiroj:

—Post nokto ventega, brilega ĉielo
Kaj aŭroro bele aperos,
Tiam la Libero plej kara juvelo
Novajn trezorojn oferos.

Kaj nia volo estos granito
El kiu ni masonos novan altaron,
Himnoj leviĝos ĝis la zenito
Glorigante heroan frataron.

El tiu ruino hodiaŭ fumanta,
Pro sanga luktado, areno
Gardenon ni faros tre bele floranta
Per nia supera socia kompreno.

N. BABASKEROF
Lens (Francio) 18-8-38.

# Por Vasta Helpmovado

Laborista esperantista movado estas rigardata de la aliaj laboristaj movadoj kiel malriĉa parenco de burĝo. Kial? Ĉu ĝi ne estas forta? Mi kredas kontraŭe, ke laborista esperantista movado estas tre forta movado. Sed ĝi ne havas sufiĉan forton en unu lando; ĝia forto estas ĉefe internacia.

Mi kredas, ke ni ne montras sufiĉe nian ekziston al la aliaj laboristaj movadoj. Ĝis nun la ĉefaj zorgoj de esperantista laborista movado estas starigi kursojn k internacian korespondadon. (Ĉu individuan, ĉu kolektivan). Kvankam kolektiva korespondado prezentas la superecon ke ne esperantistaj kamaradoj povas ĝin partopreni, tamen ĝi ne donas sufiĉan sukceson, tial ke nemultaj kamaradoj estas sufiĉe sindonemaj por: unue serĉi organizojn konsentantajn korespondadi, due por fari la tradukolaboron, k trie restarigi la aferon kiam unu aŭ alia korespondanto ŝanceliĝas. Krom tio, tiu kamarado devas ĝenerale gvidi kursojn. Laŭ mi, ni devas trovi novajn metodojn por atentigi nian ekzistadon. Mi proponas jenon: Ĉiuj esperantistaj laboristoj volas helpi la popolojn, kiuj estas nun malkuraĝe atakataj de la modernaj barbaroj nomataj faŝistoj. Sur tiu bazo, ni facile povas unuiĝi mondskale k krei vastan helpmovadon. Se mia propono sukcesos mi intencas eldoni helpmaterialon k ĝin sendi al diversaj landaj perantoj, prefere perantaj grupoj. La esperantistaj kamaradoj k eĉ la adeptoj de Esperanto kiuj pro iu ajn kaŭzo ne lernas ĝin povos disvendi la helposignojn. La mono estos kolektata en ĉiu lando, k poste en du aŭ tri landoj por sendi ĝin al la esperantistaj organizoj de atakataj landoj.

Tiuj organizoj havos kiel devon uzi la monon sendita de ni por starigi infanajn koloniojn; k en tiuj kolonioj oni instruos Esperanton al la knaboj krom la nacia lingvo. Tiel efektiviĝos paŝon al enkonduko de nia lingvo en la lernejojn, kiu estas nia plej kara esperantista postulo.

Tiun ĉi artikolon mi sendas samtempe al diversaj laboristaj esperantistaj gazetoj. Per ĝi mi alvokas ĉiujn, kiuj aprobas mian ideon, interrilati kun mi sendante sugestojn k ĉefe sin proponi por organizi la laboron.

MARC DELFORGE
33, rue de Heigne CHARLEROI (Belgio)

# Ĉu oni povas efike propagandi Esperanton per kino?

La respondo al tia demando ne estas duba: nepre jes! Sed ne sufiĉas, ke propaganda filmo estu efika. Gravas ankaŭ, ke ĝi estu praktike k ofte uzebla. Tio okazas se: —Ĝi estas malmultekosta.

—Se ĝia tekniko estas tia, ke oni povu uzi ĝin ĉie k sen aparatoj eksterordinaraj.

Pri la efikeco, tiu filmo devas:

—Esti sen titoloj k sen paroloj, komprenebla per la agado mem, per ĝiaj bildoj, kiuj estas fakte la plej internacia lingvo.

—Montri la esperantan temon je diversaj aspektoj: praktika, lingva, gastema, pacisma.

—Fine, ĝi devas ne tedi la rigardanton, sed distri, eĉ amuzi lin, k lin konduki iom post iom al pli seriozaj demonstracioj.

Povas esti interese konstati kiel oni zorgis pri tiuj precizaj konsideroj, en provo jam konata, tiu filmo *Antoŭen*, kiun faris francaj esperantistoj - okaze de la 50.ª jarfesto de Esperanto. Novaj detaloj venas hodiaŭ k klarigas kiel la aŭtoroj atentis pri la ĉi-supraj koncernaj punktoj.

La financan k teknikan punktojn solvis senpene la elekto de la filma formato 16 milimetra. Efektive, unu horo da 16 milimetra projekcio kostas de ses ĝis dekoble malplimulte ol samlonga projekcio el granda formato. Plie, la 16 milimetra filmo estas tutmonde uzebla eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj, ĉar ĝiaj projekciaparatoj estas ĉie aĉeteblaj aŭ lueblaj je malalta prezo. Ankaŭ ĝia eta pezo gravas, por la facilo de la sendoj k portadoj.

Aliflanke, *Antoŭen* estas realigita laŭ la stillinio de la moderna kino, el ritmo, el situacioj, el vivo k movo, tiel ke klarigaj titoloj aspektus tute superfluaj.

La ĉefa karaktero de *Antoŭen* estas ĝia komenca aspekto ne severa, kiu venigas la publikon, ŝtupon post ŝtupo, al la esperanta temo. Dum dudek minutoj, ĝi rakontas laŭ komika k plej movema maniero la malfeliĉojn de iu fremdulo kiu venas en Parizo, k povas paroli kun neniu. Pli kaj pli gravaj miskomprenoj okazas al li, aventuroj (en fame konataj kvartaloj) ĝis kiam nia kompatindulo perdas ĉion: vestojn, pakaĵojn, eĉ... esperon. Tiam, li renkontas esperantiston. Tiu-ĉi komprenas lian situacion; li ekinstruas al li Esperanton, per rekta metodo, borde de la rivero Seine. Tie, lokiĝas perekrana lingva demonstracio, k poste la filmo pliserioziĝas. La du kunuloj renkontas aliajn samideanojn; ankaŭ tiuj akompanas la eksterlandanon, k tiam okazas rapida vizito al la esperantistaj Parizaj medioj. De loko al loko, la amikaro pligrandiĝas, ĝis okazigi esperantistan manifestacion el pluraj centoj da personoj, meze de kiuj oni vidas multajn francajn famulojn.

Poste venas la pacisma parto, verkita laŭ simbola stilo. Kiam la manifestantoj kantas ĥore *La Espero*—n, aperas bildoj komence konfuzaj, k iom post iom pli netaj, kiuj montras militistajn demonstraciojn. Virino aplaŭdas; sed ŝia vizaĝo estas kaŝata de okulŝtopilo el ŝtofo. Tiam aperas Esperanto, simbole reprezentata per brako kun verdstela ringo. Gi eltiras la okulŝtofon por ke la virino vidu, malantaŭ la brilaj soldatoj, naŭzajn, teruregajn militajn scenojn. Poste, Esperanto kondukas ŝin poezie promeni en la alia flanko de la vivo, sur la kamparo paca, fruktodona, prizorgata de homoj, kiuj laboras, kiuj konstruas, kiuj ame daŭrigas la vivon, ĉiujn vivojn... La lastaj bildoj estas resumo de la monda ĥaoso, k aludo al la neceso de ordiga k amika solvo, kiu estas nia lingvo.

Tio ĉio estis, por niaj francaj samideanoj, ega peno, ĉefe financa. Tial ili meritas, ke ilia provo, ne ĉefe estu laŭdata, sed ke ĝi utilu.

Tiucele, por ĉiaj aliaj klarigoj, aŭ por eventuala uzo de la filmo *Antoŭen*, sin turnu al la *Societo Franca de Propagando por Esperanto* 34, rue de Chabrol, Paris-10.

# KVINDEK JAROJ DA SOCIALISTA SEMADO

En mezo de la teruraj konvulsioj, kiujn Hispanio travivas, jubileis la Hispana Socialista Laborista Partio la kvindekan jaron de sia fekunda ekzisto. Duoble valora estas la glora datreveno ĉar, samtempe ol la Socialista Partio, fondiĝis ankaŭ la Ĝenerala Unio de Laboristoj, tre populare konata per la tri literoj: U. G. T.

Per sobraj paroloj, kiel decas al la situacio, reliefaj figuroj de la hispana socialismo akcentis la malfacilaĵojn de la komenca epoko, kiam la fervoro k obstino de Paŭlo Iglesias jetis, en la sulkojn de la proleta kampo, la unuajn grajnetojn klaskonsciajn pri propra sindikata k politika organizado.

En omaĝo al la signifoplena jubileo, ne mankis gratuloj nek salutoj de la ceteraj antifaŝistaj organizoj, kiuj frate kunlaboras, kune kun la socialistoj, en la tutnacia Popolfronto. Ĉiuj senescepte: komunistoj, anarkistoj, respublikanoj k regionaj aŭtonomistoj (katalunoj k baskoj) konkurencis agnoski publike la gravan rolon de tiu sperta, pro multjareco, organizo en la liberiga batalo, kiun bravege eltenas, kontraŭ la fremda k indiĝena tiranioj, la demokrata temperamento de Hispanio.

La U. G. T. k C. N. T. densigis ankoraŭ pli forte siajn vicojn; tiel vere tio okazas, ke la alsopirata deziro, pri unusola sindikata centro, jam ŝajnas realo ĉar la jubilea okazintaĵo estis oportuna ŝanco por plifortigi la unuecon inter diversaj metodoj k doktrinoj; kvankam, eble pli konkrete ol tio, estis la efektiva masiveco, kiu cemente masoniĝis interne de la Socialista Partio mem, likvidiĝinte volonte ĉiuj apartaj tendencoj, per sincera kunfandiĝo, en la komuna socialista bloko. La iamaj dekstra, centra k maldekstra aloj definitive malaperis ĉar Besteiro, Prieto k Largo Caballero postenas hodiaŭ, apud Negrin estro de la Registaro—en la supera gvida komitato de la kvindek-jara Partio.

Kaj se la semado estis peza, la rikolto estas riĉa!

# LA PERMESO

Tiel heroe batalis la tuta bataliono, ke la Stabo decidis regali ĉiujn ĝiajn soldatojn per ok tagoj je forpermeso po grupetoj da dek homoj.

Ĉe la ekscio de la agrabla novaĵo, elverŝiĝis bruema ĝojo montrita per krioj k saltoj, miksitaj kun viglaj paroloj:

—Ho, kiel multe ni amuziĝos!. .

—Kun kia plaĉo mi iros al teatro...

—Kian surprizon ricevos mia patrino!...

- La samon mi diras pri mia fianĉino...

—Ok tagojn! Ok tagojn sen tranceoj, sen kugloj nek pafoj...

—Ok tagojn flarante parfumon de floroj k virinoj...

—Ok tagojn!...

Efektive, venis al Valencio la unua grupo el dek soldatoj kun permeso. Nur unu el la vojaĝantoj ne havis tie la familion. Ĝi loĝis malproksime, en vilaĝo de la Badajoza provinco. Pro multaj malfacilaĵoj pri veturebio, li ne povis viziti siajn parencojn. Kvankam la vojaĝo ne estis absolute neebla, ĉar iu ajn milista ŝarĝaŭtomobilo povus lin transporti tien, tamen tiuokaze la reveno oni ne povus garantii por difinita dato; k la permeso havis limon ĝis fiksita tago, kiam li nepre devas reveni en la brigado. Tio ja devas okazi sen ia preteksto. La disciplino postulas obeon!

Li decidis do ĝuadi la permeson en Valencio mem. Li ĉeestis kafejojn k bierejojn. Kaj li enuiĝis! Vespere li vizitis kinejon aŭ teatron, kie ankaŭ li tre multe oscedis. Li promenis tra centraj stratoj k placoj de la bela urbo. La montrofenestroj de butikoj magazenoj logis ĉies okulojn, krom tiuj de nia heroo. La varia kolekto de ĝiaj artikloj revivigis, ankoraŭ pli milda la rememoro pri liaj foraj geamatoj. La ludiloj naive kvazaŭ parolis pri la eta fratetoj. La brilaj ŝtofoj k la koketaj ŝuoj; la malkaraj juveloj k si kaj kaptukoj sorĉe flustris pri la edziniĝema fratino k pri la ma juna patrino. Forta melankolio kaptis lin...

Nur tri tagojn li pasigis tie. Post tiu tempo, sen plia atendo li decidis reiri denove en la fronton, apud la bonaj fidelaj kamaradoj el sia brigado. Kiam revene li jam estis inter ili, tiom mul li ĝojis, ke li neniel povis eviti larmojn ĉe la okuloj ĉar la front brigadoj, por la bravaj soldatoj de la Popola Armeo, havas sen la dubo la varmojn k ĉarmojn de ilia propra hejmo...




# La salto trans la riveron Ebro

Estas suficê interese, ankoraŭ nun, fari kelkajn komentariojn pri la vasta k grava operacio, kiun iniciatis k entrepenis antaŭnelonge, trans la riveron Ebro, la respublikana Stabo por adekvate malfortigi la pezan premadon de la faŝistaj invadintoj ĉe la orienta zono, en direkto al Sagunto k Valencio, riĉaj urboj, kiujn la malamiko obstine avidis kapti. La ŝatata deziro ŝajnis jam palpebla realo...

Por atingi rapide sian celon, ĝi akumulis k ekuzis egajn kvantojn da itala k germana materialo, ĵetante en la unuajn liniojn preskaŭ ĉiujn homajn kontingentojn, kiuj grege venis en Hispanion laŭ ordono de siaj tiranoj. En relative malgranda fronto, la landaj k eksterlandaj faŝistoj flugigis nubegon da aviadiloj k vicigis modernajn kanonojn el plej diversaj kalibroj. Sub la apogo de tiel potencaj meĥanikaj bataliloj, la italaj divizioj, helpataj de kolonianoj k indiĝenoj (marokanoj k hispanoj) sukcesis facile antaŭenmarŝi sur la ŝoseo kondukanta de Teruel al Sagunto.

Nia linio fleksiĝis. Ĝi cedis sed ne frakasiĝis! Ni ja malantaŭeniris, pro la forta premego, ĝis la proksimeco de Segorbe, sed tiu retroiro neniam estis katastrofo. Nia batalantaro aspektis kvazaŭ lerta duelanto, kiu faras ekzercajn paŝojn malantaŭen prezentante ĉiam la pinton de sia glavo al brusto de sia kontraŭulo. Nia kunpremiĝo, malrapida k metoda, ebligis forlasi preskaŭ sen materiaj perdoj kelkajn poziciojn, okupante tuj aliajn novajn defendejojn, jam antaŭe pretigitaj, por ŝirmi la enirejon al Segorbe k la vojon al Sagunto. Apud la modesta vilaĝeto Viver krevis la fanfaronaj pretendoj! Nia brava k mirinda rezistado elĉerpigis la blufon de la italaj kondotieroj, kiuj por hufumi dezertajn lokojn oferis kompletajn arsenalojn. La ceteraj helpantoj povis helpi neniel. Tie mem ĉesis la «promenado» pri kies neatendita stagno, la faŝistaj radiostacioj nerveme serĉis k elserĉis pravigojn por suflori ĉirkaŭfrazojn.

Kaj precize tiam, en tiu decida momento, nia armeo ĵetis sin aroge en la aŭdacan aventuron trairi la riveron Ebro k rompi la faŝistan fronton en ĝia okcidenta bordo. Jen objektiva ekzameno pri la atingitaj rezultatoj: Precipe, la malamiko devis ŝanĝi k modifi siajn zorge studitajn planojn. Oni haltigis abrupte ĝian iron al Sagunto k Valencio devigante ĝin forpreni elektitajn rezervojn por grati sian dorson preter la moviĝema fluejo de l'Ebro. Krom tio, nia rivera salto rimarkinde influis ĉe la psikologio de ĝia armeo k de ĝia ariergardo, akirinte pro tio niaj soldatoj masivan fidon k sekurecon je siaj propraj oferoj k rimedoj. Oni pruvis ankaŭ al la eksterlandaj filistroj, ke la Respubliko, anstataŭ ol kaduke elĉerpiĝi, ankoraŭ disponas pri obstinaj energioj k nekalkuleblaj ŝancoj. La alpaŝo de l' Ebro, por esti sukcesa, bezonis havi kiel ĉefajn kondiĉojn—krom surprizo en la ago k sekreto en la preparo—rapidecon en la plenumo k aŭdacon en la movo por alfronti k solvi ĉiujn dumajn problemojn. Matematike, ĉio okazis laŭ difinita plano!

Nia Stabo bremsas naturajn impulsojn pro la manko de abunda k taŭga materialo. Dank' al la Ne-Interveno, aplikata unuflanke, la Respubliko baraktas kun malĝojaj materiaj malfacilaĵoj, kiujn ĝi devas supervenki per lertaj k spritaj ruzaĵoj. Tamen, oni povis kalkuli pri la plej necesaj elementoj, kiuj ludis gravan rolon en la kuraĝa operacio. Ĉe la tagiĝo de l' lundo 25. de Julio—oficiala festotago en la subpremata Hispanio, honore al apostolo sankta Jakobo, iama legenda venka heroo kontraŭ la maŭroj, kies idoj nun batalas apud la tiel nomataj defendantoj de la Religio k Patrio—la popola armeo trapaŝis, ĉe kelkaj punktoj, la fortan fluejon de la historia rivero laŭ amplekso, kiu situas inter Tortosa k Mekinenza. En unuj lokoj, oni ne trovis reziston; en aliaj punktoj male, oni devis forte batali. Sed, jam ĉe la tagmezo, multaj miloj da homoj, kun multaj tunoj da materialo, kuŝis k ŝvarmis sur la transa flanko, kie pompis la ĝojo entuziasma de la simplanima loĝantaro de apudriveraj vilaĝetoj. Kia hela simptomo por deduktemaj cerboj!

Kompreneble, la malamiko reagis furioze per sia aviadilaro. Ĉiaj ĝiaj aeraj eskadroj rendevuis super la neŭralgia zono celante veki panikon. Ili fiaskis! Niaj soldatoj ne maltrankviliĝis. La batalionoj, en perfekta ordo, okupis la difinitajn poziciojn. Aperis konfuzo en nenia korpuso. Ĉiuj divizioj konkurencis pri disciplino. Dum daŭraj horoj okazis impona duelo inter la infanterio k la aviacio; kun helpo de antiaeraj kanonoj, la infanterianoj forkurigis la ŝtalajn vulturojn. Ĉe la sekvanta mateno, ili reatakis denove per centoj da aviadiloj sed, ankaŭ tiam, aplikante drastajn metodojn niaj soldatoj purigis la ĉielon...

La Ebro ne plu estas baro por nia armeo! Ĝi ekokupis, tra larĝa k longa tereno, valojn k montojn, vilaĝojn k farmodomojn. Oni prenis kvin mil kaptitojn k oni konkeris abundan materialon. Kaj, antaŭ ĉio, oni elpruvis la efektivigeblon de grandaj postaj ofensivoj... ĉar la Respubliko ankaŭ scias ataki!

* * *

La invadintoj ne rezignis pri siaj bombastaj pretendoj. La popola Stabo scias tion k atendas tion. Sed fakto ja estas, ke la facilaj faŝistaj projektoj suferis bategojn. La ribeluloj kalkulis fanfarone nur je nia deviga pasiveco. Neniam ili imagis, ke tiuj pozicioj, nature defenditaj de la Ebro-fosaĵo, povus estis atakataj. Sed tio okazis ĉar ili ne kalkulis pri la kuraĝo k sindonemo de homoj, kiam ili batalas por forĝi unue k ĝui poste civitanajn rajtojn de libera persono. Ilia disreviĝo estis kruela! Ni ne estas tro optimistaj asertante, kiel broĉon por ĉi tiuj komentarioj, ke ilin atendas ankoraŭ pli grandaj k pli doloraj disreviĝoj...

Diversajn fojojn ni diris, ke POPOLA FRONTO estas intime k rekte ligita al la ŝanĝemaj postuloj de la milito. La klara komprenemo de niaj legantoj - nun jam malnovaj amikoj - certe ne bezonas longajn klarigojn, nek eĉ etajn senkulpigojn, pri la malagrablaj zigzagoj, kiujn, rilate aperon k amplekson, prezentas lastatempe nia gazeto. En Valencio restas nur DU kamaradoj—komplete rifuzataj, el la milita servo, pro gravaj difektoj - kiuj, krom la administrado, zorgas pri la enua tasko surskribi la banderolojn k plenumi la ekspedon. La sekretario laboras nun ekster la urbo, k malrekte li devas do gvidi la korespondaĵojn. La ĉefredaktoro mem deĵoras, kiel sanitara soldato, en malproksima vilaĝo; perpoŝte—tre malfacile! - li rilatas kun la presejo, kie ankaŭ forestas la kutimaj laboristoj, spertaj en la Esperanto kompostado. Se oni taksas bone tion ĉi, komprenante kiel peze estas labori sub tiaj kondiĉoj, certe oni konsideros hodiaŭ multe pli valoran nian veteranan bultenon. Pro tio, anstataŭ plendetoj, ĝi ricevos ankoraŭ pli firman subtenon por ke la redaktoroj, sen tempo por ripozo, por honoro de la justo, por la bono de Esperanto k por sincera dankemo al siaj tutmondaj helpantoj, estu pretaj neniel k neniam dizerti, antaŭ la malamiko, el ĉi tiu, ankaŭ trapafita, informa tranĉeo...

## NIAJ VOLONTULOJ

# Aŭstralianoj en la Hispana milito

Servis en la Internacia Brigado 42 aŭstralianoj, el kiuj mortis 20. Jenmaniere: 10 dronis en la «City of Barcelona», kiam ĉi tiu ŝipo ricevis torpedon apud Valencio pasintjare; 5 aliaj mortis en la Angla-Irlanda kolono, 4 en la Franca, k 1 en la Usona. Mi mencias la nomojn de kelkaj el tiuj sindonemaj batalantoj.

**Ron Hurd,** instruita ĉe Melburna Altlernejo, servis en la lerneja oficira regimento. Aliĝis al la Hispana Armeo fine de jaro 1936. Dufoje vundiĝis dum kvin monatoj da servo. Nun li estas en Melburne k laboras por la hispana afero.

**Jack Barry,** laborista sindikata organizanto, mortis.

**Ted Dickenson,** de Sydney. Ekzekute mortpafita de la faŝistoj en Februaro 1937, post Jarama batalo. Li ĵetis en la dentojn de siaj fusilantoj: «Ho, se ni nur havus ĉe nia flanko 40.000 aŭstraliajn kamparanojn, ni pelus vin, murdistojn, en la Mezan Maron!»

**Jack Newman,** de Port Adelaide, mortis ĉe la konata fronto Jarama.

**Ossie Stevens,** de Melbourne, mortis dum Junio 1937, en vilaĝo de la centra fronto. Religia idealisto, li batalis por sia koncepto de kristaneco.

**Jack Stevens,** de Perth, mortis ĉe Brunete ankaŭ dum Junio 1937.

**Lou Elliot,** de Ŝtato Kvinslando. Batalis depost Oktobro 1936. Vundoj ĉe Jarama k Belchite. Li prenis la lokon de la fama angla komunista aŭtoro. Ralph Fox, kiel politika komisaro.

**Ken Mophee,** de Sydney, vundiĝis jam kvinfoje.

**Ja k Kirkpatrick,** de Kvinslando, bonstatulo en Anglio, li vendis ĉion k aliĝis en Decembro 1936. Li tre grave vundiĝis ĉe Jarama.

**Orme Downing,** de Melbourne, estis vundita tri fojojn en Francio ĉe la Aŭstralia Armeo en 1916-18. Malgraŭ multa aĝo li trabatalis la Jarama-batalon, malsaniĝis, k fine invalidiĝis.

**Dick Wh teley,** nun en Melbourne, ano de la Thaelmann-kolono. Defendinto de Madrido en Novembro de 1936. Li estas, mi kredas, menciita de Esmond Romilly (parenco de Winston Churchill) en ties verko «Bobadilla».

**Ralph Baynham,** unu el la herooj de Teruel. Ankoraŭ nun li batalas.

F. R. BANHAM

Victoria (Aŭstralio).

# JEN TRE NOBLA KONDUTO!

La Hispana Registaro ĉiam estas preta malakrigi la teruraĵojn, kiuj sembride nun regas. Atestas pri tio la prudenta sinteno neniam bombardi malfermajn urbojn en la faŝista zono, eĉ nek kiel ĝusta respondo al la krimoj de la fremda aviadilaro je la dispono de la ribelintoj, ĉar la loĝantoj en urboj el faŝista zono ne kulpas.

Tiaj humanaj deziroj ankaŭ ne haltas tie ĉar militkaptitoj ne estas konsiderataj kiel ribeluloj sed kiel normalaj civitanoj. La leĝo ne persekutas opiniojn; ĝi nur punas la konkretajn agojn, kiuj endanĝerigas la ŝtatan sekurecon. Ĉiam estis honesta intenco de la popolaj gvidantoj eviti aspekton de venĝemo al la natŭra memdefendo de siaj rajtoj. Solene promesite estas en fama deklaracio ke, post la milito, larĝa amnestio redonos senescepte al ĉiuj hispanoj la eblon partopreni en la nacia rekonstruado. Kaj, eĉ hodiaŭ, dum la flamoj ankoraŭ kirliĝas, atenteme zorgas la legitima aŭtoritato forigi akutecon. laŭ eblo k povo, al la impona tragedio. Hela pruvo, pri multe pli bonaj deziro por la estonteco, estas la tre interesa k signifoplena dokumento, kiun nia Registaro sendis a la brita Komisiono oficiale funkcianta en Tolouse (Francio) por aranĝi interŝanĝon de kaptitoj inter ambaŭ batalantaj zonoj. La regularo de ĉiu dokumento tekstas jene:

«Fidela al sia neŝanĝebla normo, la Hispana Registaro submetas al via ekzameno la sekvantajn proponojn:

1.ª Deteni la ekzekutadon de ĉiuj mortpunoj, deciditaj aŭ decidotaj pro deliktoj, kiujn oni faris ĝi la 1. Septembro 1938. eĉ kiam ties malkovro, sed ne la plenumo, okazos post tiu dato.

2.ª La ribelaj aŭtoritatoj devas promesi, pri tio, plej rigoran reciprokecon, kiun garantios la brita Komisiono.

3.ª La prokrastado en la ekzekutoj validos dum la daŭro de tuta Septembro k tio estos bazo por reciprokaj akordoj, pere de la sama Komisiono. La decido validos ĝenerale por ĉiu arestito aŭ kondamnito en la ribela aŭ lojala teritorioj.

4.ª La deliktoj, kiujn oni faros post la kuranta Septembro, ne restos sub la influo de ĉi tiu propono.

Kredas la Registaro fari, pere de sia informo, gravan paŝon por humanigi la militon k alproksimigi la pacon atendante, pro tio. ĝian serenan studadon flanke de la neŭtrala publiko internacia k de tiu honorinda brita Komisiono.

Barcelono 30. Aŭgusto 1938.

Julio ALVAREZ DEL VAYO
Ministro por Eksteraj Aferoj.

# NIA POŜTO

## La sorto de konsciaj laboristoj en Aŭstrio

Ĉu ankoraŭ ekzistas tiaj homoj en Hitlerio? Ĉu ili jam adaptiĝis al la nova abomena sistemo?

Malantaŭ la tragedio de la anekso de Aŭstrio, kaŝiĝas multe da mizero k doloroj, flanke de la personoj pensantaj kontraŭ la *nazi*-teorioj.

Multaj el tiuj amikoj jam kuraĝis senmaskiĝi dum la lastaj manifestacioj de la Aŭstria popolo. Ili faris tion por logi la rigardojn de tutmondo pruvante, ke la germana registaro ne absolute povas majstri sian aventuron en Aŭstrio. Precipe en Graz (mia regiono k faŝista fortikaĵo) plej multe suferas la malnovaj socialistoj. Tamen, nia popolo silente baraktas ĉe la ungoj de la nova tiranio, kiu estas trioble pli terura ol la ĝisnuna diktaturo. Vana estis la intensa kontraŭstaro; perditaj la ĵus gajnitaj rajtoj de la laboristaj sindikatoj, nur eknaskiĝintaj kelkajn semajnojn antaŭ la renverso. Velkis la ekflorintaj modelaj Esperanto-organizoj...

Kaj ĉio nur okazis, pro la nedecidemo de la okcidentaj demokrataj landoj. Eĉ potencaj laboristaj organizoj ŝajne forgesis, ke tie ekzistas multaj samideanoj. Sed la laboristaro, kiu konsistigas la plimulton el la 6 miliona loĝantaro, diversfoje pruvis, al la ekstero, ke ĝi scias batali, suferi k morti por plej altaj idealoj.

La nacisocialistoj, tuj post sia venko, enkarcerigis en la koncentrejoj la plej fervorajn amikojn de l'popolo, sed oni liberigis kelkajn el ili por ne montri tiam, tro frue, sian veran vizaĝon. Sed, hodiaŭ, la liberecanoj ĉiu-*tendencaj* ĝemadas sub la jugo de la monstro internacia. Hodiaŭ jam oni scias, ke la arestatoj povas vidi neniun konaton, dum daŭro de longa tempo. Kruela puno tio estas!

Spite al ĉiuj persekutoj k doloroj la Aŭstria popolo forte esperas, ke iam krepuskos la hela mateno de la fina sopirata libereco, en mezo de la interfratiĝo de ĉiuj popolo, malgraŭ la fakto, ke nun tio, anstataŭ revo ŝajnas herezo...

MARKSANO

# MOZAIKO

● La krudaj postuloj de la milito devigis fari dekreton por rekta interveno registara en ĉiuj fabrikoj, kiuj produktas militmaterialon. Tiu ĉi dekreto, pro doktrinaj konsideroj, ne ricevis la aprobon de la Kataluna Maldekstra Respublikana Partio, kies reprezenta ministro demisiis. Tiun paŝon sekvis, pro komuneco en agado, la alia ministro de la Baska Naciista Partio. La krizo facile tuj solviĝis per aliĝo de du novaj ministroj, reprezentantoj de la Socialista Unuiĝinta Partio de Katalunio k Naciista Agado de Baskio: tiamaniere, la kataluna k baska popoloj rekte intervenas en la taskojn de la centra Registaro.

● La respublikanaj aviadiloj daŭre rikoltas sukcesojn tra la ĉielo de Hispanio, pli ol cent faŝistaj aviadiloj falis dum la monato Aŭgusto. Nur en unu tago, post impona aera batalo, falis 19 malamikaj aparatoj, kiuj kune kun multaj aliaj luktis kontraŭ malgranda popola eskadro, el kiu perdiĝis nur kvin aparatoj. En tiu batalo ne mankis heroegaj agoj.

## SALUTO EL HINDIO

El malproksima Hindio, mistika lando kie la perforto estas forte malŝatata, venis jena kuraĝiga letero por la estro de la Armeo batalanta trans la Ebro:

«Ni sekvas, kun miro k admiro, la venkojn, kiujn la Armeo de la Respubliko atingis apud la rivero Ebro. Je nomo de la hinda popolo, mi gratulas vian kuraĝon k esprimas omaĝon por la falintoj. La oferoj de viaj soldatoj puŝos antaŭen la progreson de la mondo!»

Nawaharlal NEHRU
Gvidanto de la hinda naciista movado.

● Sur la maro, ankaŭ ne velkas la kuraĝo. La respublikana detruŝipo «Luis Diez» kiu estis en franca haveno, ricevis ordonojn por atingi la ceterajn ŝipojn de la eskadro. La faŝistoj elpruvis ĉiujn rimedojn k ruzaĵojn por kapti la ŝipon, kiu sukcesis trapasi la markolon de Gibraltaro, kie dejoris atendante ĝin la tuta faŝista eskadro. Nia ŝipo brave eltenis la atakegon de sep kontraŭuloj, adekvate respondante la artileriajn pafojn, k save atinginte la havenon de Gibraltaro, kie ĝi nun kviete ripozas kun ne gravaj sed honoraj vundoj.

● La bando, kiu sub pedanta nomo de «registaro» loĝas en Burgos, respondis jam finfine la demandojn de la angla Registaro pri retiriĝo de la «volontuloj». Pere de ĉirkaŭfrazoj k fanfaronaĵoj, oni sabotas la planon, malebligante la efektiviĝon de praktika ne-interveno. Tia konduto kontrastas kun la klara tre rapida respondo de la legitima Registaro, plene akceptante la anglan proponon por limigi la konflikton ĉe la nacia teritorio.

● Per ĵusa dekreto, la Hispana Registaro reorganizis la institucion pri la politikaj komisaroj, kiuj tiel bone plenumas sian kuraĝigan rolon en la Popola Armeo. De nun, la komisaroj havos pli rektan intervenon en ĉiuj aferoj iel ajn rilatantaj kun la klerigo k plenrajteco de la soldatoj.

● Paralele kun la atakoj en direkto al Valencio, la faŝistoj entrepenis bombastan ofensivon en Ekstremaduro. En la komenco, niaj trupoj devis cedi terenon sed post malmulta tempo, ili men komencis vastan kontraŭofensivon, kiu sukcese regajnis la perditajn lokojn, kaptinte eĉ kompletajn regimentojn volonte fordonante la armilojn sub la deviza krio: Vivu la demokrata Respubliko!

● La ambasadoro de Italio, en la faŝista zono de Hispanio, vojaĝante per aŭtomobilo, suferis atencon, kiu kaŭzis vundojn al lia edzino. La subpremataj hispanoj ne akceptas facile la barbaran sklavecon...

● La Nacia Komitato de la C. N. T. decidis pretigi la eldonadon de la plena verkaro de Anselmo Lorenzo, fervora iniciatinto en Hispanio de la anarkista movado. Tio montras altan liberecon pri politika kulturo!

● Oni scias absolute fidinde, ke la policestro de Franko havas dikajn tekojn, kiuj entenas pli ol unu milionon da slipoj. Tiu «nigra» listo devenas de antaŭ ol la milito k ĝi detale mencias la nomojn de ĉiuj personoj iomete elstaraj en respublikanaj k laboristaj organizoj. Kiam la faŝistoj konkeras iun urbon aŭ vilaĝon, tuj oni serĉas la koncernajn enlistitojn, kiuj suferas rapide la morton aŭ la enkarcerigon. Tiel sekrete oni gardas la enhavon de tiuj teruraj listoj, ke neniu scias pri sia tiea esto aŭ malesto. Tie, ĉie regas angoro simila al mezepokaj tempoj de la Inkvizicio.



Sanitaraj brankardistoj en la fronto

## POPOLFRONTA LETERUJO

Laborista Grupo Esperantista. Ĉikago.— K-do Farenc transsendis al ni vian leteron, kies enhavon ni danke notas. La monsendo ankaŭ ricevita. Saluton!

A. G. – Tbilisi. Vian alvokon al la gestudentoj ni transsendi al la Studenta Federacio: Tiu organizo, ni esperas, respondos al vi. Nian gazeton ni sendos al vi regule.

E. C. Haigh. - Birchgrone. – Ni dankas la alsendon de la revuo kun traduko de unu el nlaj antikoloj.

Lab. Esp. Klubo.—Amotfors.— Vian salutleteron ni recevis k dankas. Ankaŭ ni recevis la gazetojn kun tradukaĵoj de nia gazeto. Ni reciprokas viajn salutojn!

H. Taherzadeh. – Abadan. — Ni ricevis vian afablan leteron k dankas viajn klopodojn por nia afero k viajn kuraĝigajn vortojn k salutojn el malproksima Persio.

E. Barannivok. – Moskvo. — Ni enketas pri via anonco k dankas viajn donacojn. La versaĵon ni ankaŭ publikigos.

F. R. Banham. - Essendon. Vian interesan leteron ni ricevis k kun granda atento legis. Ni bone notis ĝian enhavon k dankas.

B. Berin. – Gomel. – Ni ricevis viajn leterojn k poŝtkartojn k ni klopodos plenumi viajn dezirojn.

Fabret. - Drancy. Ni dankas viajn salutleteron k mondonacojn. k publikigas la petitan anoncon.

Holloway. - Gisborne. — Letero ricevita. Viajn bondezirojn ni dankas.

B. Mitchell. — Cowdenbeath. - ĵus je la dato de via letero ni estis ekspedantaj la julian numeron, kiun bedaŭrinde ni pretigis tre malfrue pro la nunaj cirkonstancoj. Ni petas senkulpigon k supozas la gazeton jam en viaj manoj.

Welser. — Morlaix. — Laŭ viaj instrukcioj ni sendas vian ekzempleron al k-do Guillou. La ceteron de via ŝatata poŝtkarto ni bone notas k respondas, ke vi tute pravas k estas terura ignorado de la tutmondaj laboristoj, ke ili ne ankoraŭ evitas la ekspedon de pormilitaj krudmaterialoj al la faŝistaj landoj. Saluton!

P. E. U. – Issy les Moulineaux. — Dankon por viaj letero k mondonaco. Vian novan adreson ni notis k al ĝi ni sendas la nombron da ekzempleroj, kiujn vi menciis.

Manoel. — Lisbono. – Vian kortuŝan leteron ni legis k krom kompato por viaj suferoj ni sentas admiron por via kuraĝo en la lukto kontraŭ vialanda faŝismo. Saluton!

N. Kavenius. Helsinki. — Ni rilatas vian leteron. La anoncon ni publikigis en la junia numero. La PK-on por via k-do ni transsendis, la petitajn broŝurojn ni sendis k dankas vian monsendon.

Al Kelkaj. – Kiel vi vidas ni laboras k batalas en Hispanio mem. Se iuj bojas, tio pruvas ke ni vojas... Antaŭen!

# NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia Esperantistaro | 192 | ptoj. |
| J. G. Bazo 8.ª | 100 | » |
| Vundita anonimulo | 5 | » |
| J. O. B.- Bazo 3.ª | 9 | » |
| P. C. S —Bazo 4.ª | 3 | » |
| B. K.—Barcelona | 25 | » |
| A. B. Barcelona | 4'50 | » |
| A. S. P.- Bazo Turia | 5 | » |
| F. S. U. - Navahermosa | 25 | » |
| Monkolekto, C. 34 | 60 | » |
| T. M.—Albacete | 32 | » |
| M. T.—Gata de Gorgos | 15 | » |
| F. F. - Bazo 6 ª | 25 | » |
| J. T. - Fronto | 25 | » |
| J. Y. Ll. Bazo Turia | 5 | » |
| R. S. M. - » » | 5 | » |
| A. M. A.— » » | 5 | » |
| A. S. G.- Cartagena | 15 | » |
| C. O. Bazo 3.ª | 10 | » |
| E. H.—Bazo 3.ª | 100 | » |
| A. F.—Barcelona | 30 | » |
| T. M.—V. de la Jara | 10 | » |
| P. S.- Orihuela | 20 | » |
| J. A.- Bazo 4.ª | 10 | » |
| J. S. C Peralada | 10 | » |
| R. R.—Bazo 1.ª | 25 | » |
| J. L. B.—Bazo 3.ª | 100 | » |
| J. M. B.- Bazo Turia | 5 | » |
| G. E. O. - Orleans | 10 | ffr. |
| P. M.—Montrouge | 50 | » |
| P. C.—Oyonnax | 6'50 | » |
| A. M.—Montpellier | 10 | » |
| O. B. Leuhan | 10 | » |
| J. L.—La Mans | 60 | » |
| J. W.--Finisterre | 10 | » |
| L. G. E.- Chicago | 166'67 | » |
| B. B.—Macon | 10 | » |
| J. R. Saint Etienne | 10 | » |
| V. R G —Paris | 10 | » |
| E. M.—Mistek Zadvor CSR. | 12'25 | » |
| C. P.—Vaulx en Velin | 10 | » |
| G. E. O.—Orleans | 8'50 | » |
| M. G.- Besancson | 60 | » |
| C. L. G.- Quimper | 20 | » |
| G. L.—Gien | 15 | » |
| G. E O.—V. Drency | 24 | » |
| Mlle. L - Bihorel | 20 | » |
| E. J.—Boisquillamne | 20 | » |
| G. N.—Stockholm (Svedio) | 40 | » |
| D. M. B.—Tananariva Madagascar | 20 | » |
| F. B.—Paris 17 | 25 | » |
| J. B.—Reinowitz | 24 | » |
| G. N.—Stockholm (Svedio) | 100 | » |
| A. J.- Eybens | 15 | » |
| J. F. V. Paris 9 | 50 | » |
| E. V.—Estonio | 15 | » |
| J. W.- Strasbourg | 30 | » |
| Gpo. F. E. T. - Sallaumines | 10 | » |
| W. L.— » | 10 | » |
| S. K.— » | 5 | » |
| B. Z.— » | 5 | » |
| G. G.—Billy Montigny | 5 | » |
| Y. M. - Sallaumines | 3 | » |
| F. F.— » | 3 | » |
| J. F.— » | 2 | » |
| F. B.— » | 2 | » |
| J. J.— » | 2 | » |
| J. L. S.—Los Angeles | 34 | » |
| A. B. kaj T. K.—Trebic CSR. | 43'47 | » |
| D. L. E. A —Aabihoj. Danio. | 177'16 | » |
| L. E. K.—Saint Quentin | 20 | » |
| A. M.—Saint Quentin | 5 | » |
| M. L.—Saint Quentin | 10 | » |
| J. D.—S. Genevievé d. B. | 30 | » |
| P. M. Montrouge | 50 | » |
| A. M.—Quessy | 10 | » |
| J. V.—Bagneux | 15 | » |
| Y. L.- Bihorel les Rouen | 25 | » |
| C. P —Vaulx en Velin | 10 | » |
| Solidarita.- Plzen CSR. | 60'24 | » |
| J. A.—Akureyri - Ysland | 10'50 | » |
| Ch D. Lille | 15 | » |
| A. S.—Amsterdam | 0'25 | gd. |
| D. B.—Huizum Fr | 1 | » |
| G. P. de B —Enschede | 3 | » |
| Sekcio Lekkerkerk F. L. E. | 2 | » |
| H. J. H. Amsterdam | 0'50 | » |
| G. J. W.—Den Haag | 2'50 | » |
| G. P. de B.--Enschede | 3 | » |
| E. G.- F. L. E.—Lekkerkerk | 2 | » |

## ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

ĜENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono
GUSTAVE FARENC
53, Rue Brise-Pain
Poŝtĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I
poŝtĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

BELGIO
K-DO M. DELFORGE
33, Rue de Heigne
Postĝiro 199106
CHARLEROI

ANGLIO
K-DO O. MELTON
23 Fowler Str. Nechells
BIRMINGHAM 7

SVEDIO
ARBETAR ESPERANTISTEN
Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.
Postĝiro n.º 53411
STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

| | | |
|---|---|---|
| J. R.- Hoorn | 0'20 | » |
| C. K.—Naaldwijk | 2'50 | » |
| B. H. L —Rotterdam 2. | 2 | » |
| D. O.—Den Haag | 0 95 | » |
| H. N.—Malmö | 2 | sv. kr. |
| A. J.— » | 3 | » |
| G. R.— » | 2 | » |
| A. L.— » | 2 | » |
| B. A. P.- Stockholm | 3 | » |
| G. N.—Skara | 5 | » |
| H. C.- Falköping | 2 | » |
| P. O.- Götebörg | 15 | » |
| V. T.—Turku—Finlando | 0 30 | » |
| F. O.- Turku—Finlando | 0'30 | » |
| G. M. B.—Kiruna | 5 | » |
| H. N.- Malmö | 2 | » |
| S. F. Kalmar | 2 | » |
| G. E.—Leksand | 3 | » |
| H. Y.- Boras | 3 | » |
| L. E. Klubo. - Malmö | 10 | » |
| E. A.- Ravlanda | 2'50 | » |
| E. Klubo.- Sundsvall | 10 | » |
| K. A. - Sodertalje | 10 | » |
| K. N. E.- Helsinki Finlando | 3 | » |
| H. N.-- Malmö | 4'50 | » |
| Alia kamarado | 0'50 | » |
| G. M B. Kiruna C. | 4 | » |
| H. R - Falun | 5 | » |
| M. C.- Brevlada | 3 | » |
| T. A.—Stockholm | 10 | » |
| Ĉ. Ĉ J.—Perak Malaya 3. | 1 1 2 | ŝil. |
| J. B. London S. W. 17. | 1 | » |
| V. V.-- » » 17. | 2'6 | » |
| E. L. O.- Ealing W. 5. | 5 | » |
| J. W. D.—Bayswater. A. | 4'9 | » |
| H. M.- Saltcoats | 1 | » |
| W. S.- Nelson | 2 | » |
| F. S.- York | 1 | » |
| W. B. M.—Cowdenbeath | 1 | » |
| C. W. R.—Long Eaton | 2'6 | » |
| G. R. M. - Stone | 3 | » |
| A. W. G.—Stapleford | 2'6 | » |
| J. B.—London S. W 17. | 1 | » |
| R. S.—Letchworth | 5 | » |
| E. A.—Folkestone | 2 | » |
| P. J. C.- Letchworth | 5 | » |
| S. H. Wollaton | 2'6 | » |
| R. G. Sheffield 2 | 2 | » |
| H. V. D. Manchester | 2'6 | » |
| R. W. S.—Chatham | 2 | » |
| C. J. M.- Herts | 5 | » |
| E. L. O.- Ealing W. 5. | 25 | ptoj. |

### JAM APERIS!

La broŝuro pri la arto detruita jam aperis. Pri ĝia ekspedo zorgas la Nacia Patronado por Turismo. Ĉiu leganto devas ricevi unu ekzempleron; okaze de nericevo oni sin turnu al ni.

# INFORMEJO

K-do J. Veldkamp, Warandestraat 25, Huizen, N. H., Nederlando, petas informojn pri K do Heinz Häuser, kies lasta adreso estis: Plaza Altozano, S. R. I., 10 H.

K-do Jozefo Tenenbaum sciigas al siaj amikoj, ke lia farto estas bona. Li nuntempe batalas ĉe la orienta fronto, k lia poŝta adreso estas str. Mar 25, Valencio.

# KORESPONDADO

**Simpla trilinia anonceto 4 f. fr.**

HISPANIO.—K do Jose Orpi Baldris, 163 Brigada Mixta, 2.º B tallon, 1.ª Compañia, Base 3.ª C. C. n.º 8, 38 Division, dez. kor. kun eksterlandaj gesamideanoj.

HISPANIO.- K-do Karpati Bela, S. R. I, Plaza Altozano n.º 78, Barcelono, kiu troviĝas en la fronto, dez. kor. kun gek doj precipe el Barcelono k Valencio.

HISPANIO.- K do Joan Serra, str. Carles Marx 15, Peralada (Gerona), dez. kor! k. ĉ. l. k interŝ. PM k PK. Certa respondo.

HISPANIO.—K-do, kiu gvidas Esperanto-kurson en la fronto, dez. ricevi ĉiajn esperantaĵojn por fari ekspozicion. Adreso: K.do Restituto Albero Garcia, 127 Brigada Mixta, 508 Batallon, Plana Mayor, Estafeta de 28 Div., Base Turia C. C. n.º 13.

HISPANIO.—K-do Sotero de la Cruz Juarez' 65 Brigada Mixta de Carabineros, 2.º Batallon, 4.ª Compañia, Base 1.ª C. C. numero 4, dez. kor. kun meksikaj gek-doj

FRANCIO: K do G. Nourry, 31 R. de la Liberté, Drancy (Seine), dez. kor. pri ĉ l. k interŝ PM.

SOVETIO.—K-do Aleksandro Kasjanenko, Akademiĉeskaja 27 Stalingrado, dez. kor. kun Hisp. Ankaŭ organizas kolektivan korespondadon kun stalingradaj gelaboristoj, geoficistoj, gestudentoj. ktp.

SOVETIO. - K-do A. A. Jonov, B. Peĉtova-ja 18. kor. 18. kv. 7, Moskvo-82. dez. kor. k. ĉ. l. k interŝ. per novaj P. M. minimume 40 fr. fk. Interŝ. laŭ katalogo Yvert k sen ĝi. Sendu unue! Afranku filatele! Certe respondos! Anonco valida ĉiam!

HISPANIO - K do Ricardo Rubio, Batallon de Montaña, 6.ª Compañia, Base 1.ª C.C. n.º 1, dez. kor. k interŝ. revuojn kip ĉefe kun gefrancoj. Tuj respondos.

SOVETIO.—K do J. Korotkov. str. Transportnaja 7.ª, Voronej dez. kor. k. ĉ. l. k interŝ. P. M., P. K., monerojn, gazetojn, insignojn. ktp.

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia